

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Maj 1945

33 årg. Nr 5

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Esperanto i radio.

Till A.B. Radiotjänst överlämnades den 17 april av Svenska Esperanto-Institutets ordförande och sekreterare en framställning om återinförande av regelbundna radioutsändningar om och på esperanto. Framställningen var underskriven av prof. Björn Collinder, riksgäldsfullmäktig Ernst Eriksson, länsassessor Bengt Fogelberg, riksdagsman Sigurd Lindholm, folkskollärare E. Malmgren, byråchef Erik Malmkvist, bibliotekarien Sam Owen Jansson, redaktör Paul Nylén, läroverksadjunkt John Stenström, rektor Karl Söderberg och riksdagsman Algot Törnkvist.

I framställningen ha instämmanden gjorts av omkr. 400 representativa män och kvinnor från skilda grenar i svenskt samhällsliv. Bland under-tecknarna märkas sålunda biskop Edv. Rodhe, landshövdingarna Rich. Sandler och Ivar Vennerström, prof. Lydia Wahlström, riksdagsmännen E. Berling, E. Blad och John Lundberg, chefen för N.T.O. ombudsman Erik Sehlin, chefred. L. Saxon och ordf. i De blindas förening jur. kand. Ernst Retsler.

Man måste med glädje konstatera att namnlis-torna visa att esperantos sympatisörer finnas inom de mest skilda områden i landet. Ett 100-tal olika yrkes- och tjänstemannagrupper finnas representerade samt ett 40-tal olika förtroendeposter. Sympatiuttalanden ha sålunda gjorts av 73 folkskollärare, 30 stadsfullmäktige (däribland 11 stadsfullmäktigeordf.), 24 redaktörer, 17 överlärare, 12 rektorer, 11 ombudsmän, 10 skolstyrelseordf., 7 borgmästare, 20 präster o. s. v. De blinda representeras av 3 redaktörer för blindtidningar, 6 ordf. och 4 sekr. i de blindas länsföreningar. Framställningen stöddes även av ett stort antal ordf. i olika slags föreningar, t. ex. arbetarekommuner, fackföreningar, föreläsningföreningar, kvinno-klubbar, scoutdistrikt, ungdomsklubbar, ABF-distrikt och ABF-lokalavdelningar.

Framställningen, vars ordalydelse meddelas här nedan, mottogs på Radiotjänst av dr Gullberg, som meddelade, att den kommer att behandlas med det snaraste. Han ansåg sig dock f. n. icke kunna uttala sig om tekniska möjligheter förefinnas för esperantoutsändningar redan under kommande höst.

Petitionen lyder sålunda:

Till A.-B. Radiotjänst, Stockholm.

På skilda områden pågår för närvarande en intensiv planering inför de många problem, som efterkrigstiden väntas komma att medföra. Bland annat torde återstäl-landet och fördjupandet av de mellanfolkliga förbindel- serna komma att erbjuda betydande svårigheter och kräva oerhörda insatser, icke minst av de nationer, som i stort sett skonats från krigets härjningar. Därvid kan frågan om införandet av ett internationellt hjälpspråk med all sannolikhet förmodas vinna ökad aktualitet, och esperan- torörelsen i olika länder — såväl krigförande och ockupe- rade som neutrala — har därför i tid börjat förbereda de väsentligt vidgade arbetsuppgifter, som torde komma att åvila den efter kriget. Som ett led i denna andliga bered- skap av internationell räckvidd vilja undertecknade till Radiotjänst rikta en vördsam hemställan, att regelbundna program på och om esperanto från och med hösten 1945 måtte utsändas i svensk radio.


Alltsedan den veterligen första radioutsändningen på esperanto ägde rum från London år 1922, ha mer eller mindre regelbundna esperantoutsändningar förekommit från framför allt australiska, engelska, franska, holländ- ska, italienska, ryska, spanska, tjeckiska, tyska och öster- rikiska radiostationer. Ett särskilt omnämnande förtjäna de utmärkta esperantoprogram, som före kriget sändes från Brno, Prag och Rom, vilken sistnämnda station även regelbundet utgav ett cirka 60-sidigt häfte på esperanto med månadens radioprogram.

Även i svensk radio ha värdefulla och högt uppskattade esperantoprogram tidigare förekommit. Esperanto kan dock icke sägas ha ägnats den uppmärksamhet och det utrymme, som motiverats av esperantorörelsens ideella karaktär och praktiska syfte.

Tidigare enskilda eller kollektiva framställningar om återupptagande av de regelbundna esperantoprogrammen i svensk radio ha avslagits med den motiveringen, att den under kriget inskränkta sändningstiden och det ut-

KRING KONGRESSEN.

Svenska Esperanto Förbundets årsmöte 1945.



Kongresskommittén har som vanligt massor av göromål. Underlätta vårt arbete genom att ofördröjligen insända deltagaranmälan till

ESPERANTO-KONGRESSEN
Tegelbacken
Stockholm

och insätt samtidigt avgiften Kr. 5: — å postgiro-konto 5 64 63. Glöm heller inte de nästan oöverstigliga svårigheterna att anskaffa rum åt dem som anmäla sig i sista minuten.

Program:

Pingstafton samlas vi i studenternas nya flotta kårrestaurang till Interkonatiga vespero med supé och dans. Tiden är utsträckt till kl. 2 och hoppas vi därmed att de sex timmarnas samvaro skall räcka till för att vi allesamman ska hinna bli rik-

rymme, som de statliga krisåtgärderna tagit i anspråk, gjort det omöjligt att tills vidare annat än högst sporadiskt ägna sändningstid åt esperanto. Samtidigt har det dock välvilligt ställts i utsikt, att esperantoprogrammen skulle återupptagas, så snart det funnes möjlighet därtill.

Från och med innevarande år har sändningstiden åter kunnat utökas, och av de uttalanden, som riksprogramchefen Yngve Hugo och andra ledande radiomän gjort i samband med Radiotjänsts 20-årsjubileum, framgår, att de närmaste åren beräknas bjuda på ytterligare utvidgningar. I detta läge anse vi tiden vara inne att på nytt — och i större utsträckning än tidigare — öppna radion för esperanto, som genom sin användning på olika områden visat sig väl motsvara de krav man har rätt att ställa på ett mellanfolkligt hjälpspråk. Esperantoprogrammen i radio böra förslagsvis omfatta dels systematiska kurser och föredrag, företrädesvis avsedda för svenska lyssnare och därför väl lämpligen sända på mellanvåg och långvåg, samt dels — på kortvåg — nyhetssändningar, föredrag, uppläsningar, reportage, rapsodier och konserter, som äro ägnade att sprida kunskap om Sverige i andra länder och därmed bidra till främjandet av mellanfolkligt samarbete och samförstånd. Svenska esperantoinstitutet och enskilda esperantister skola utan tvivel — i den mån så önskas — med glädje vara behjälpliga vid anordnandet av sådana program.

Det är vår livliga förhoppning, att Radiotjänst nu anser sig ha möjlighet att genom bifall till denna vår framställning göra ännu en svensk insats i fredens, folkförsoningens och de praktiska mellanfolkliga förbindelsernas tjänst.

tigt bekanta med varandra. Ju fastare vänskapsbanden knyts mellan esperantisterna desto starkare blir hela Förbundet!

Under **förhandlingarna på pingstdagen** vill vi gärna hoppas att Högskolans C-sal kommer att bli fylld till bristningsgränsen av diskussionsivriga och beslutsamma esperantister. Många och viktiga frågor vänta på sin lösning och vårt efterkrigsprogram måste bli slagkraftigt — de av våra utländska meningsfränder, som ännu finnas kvar, vänta sig mycket av det från krigets färd förskonade Sverige.

Pingstdagens kväll samlas vi efter välförrättat förhandlingsarbete till "En afton hos Grupo Esperantista de Stockholm", för kvällen förlagd till MARGARETA-SKOLANS lokaler Adolf Fredriks Kyrkogata 10, 2 tr. Två av klubbens premiäraktörer bjuder oss först på Strindbergs "Pario" — en halvtimmes god teater, varpå följer en enkel te-supé. Redaktören för Viva gazeto bjuder oss sedan på smakbitar ur sin "Extra-press-stopp-nyttkvällsupplaga". Det blir poesi och prosa, nyheter från esperanto-fronten, reseskildring, insändare-avdelning, tävlingssida m. m. m. m. Allt för prenumeranterna!

Annandag pingst kl. 11 inbjuder Stockholmssektionen av Kristana Esperanto Ligo till **Esperantogudstjänst** i Missionskyrkan Valhalla, Mästersamuelsgatan 57. Inledning av Arthur Wallin. Predikan av Ivar E. Karlsson (ordf. i K.E.L.I.). Solosång av fröken Gunvor Enocson. Vid orgeln: Bertil Wallin. Predikan tolkas i sammandrag till svenska.

Efter gudstjänsten serveras kyrkkaffe.

Därefter utflykt eventuellt med besök å Skansen eller till vårt Sommarhem, varvid kongressen avslutas.

Vid kongresskommitténs första sammanträde kunde det första tjoget anmälningar noteras. Vi räknar dock med att denna siffra skall komma att tiodubblas och hoppas sålunda att den 39:de SEF-kongressen skall få rekordanslutning. Och så hoppas vi förstås också att alla som ämnar sig till Stockholm i pingst redan insänt sin anmälan och deltagaravgift.

I samband härmed vilja vi erinra om möjligheten att stödja kongressen ekonomiskt. De som ej ha tillfälle närvara kunna insätta kr. 2: 50 på postgiro 5 64 63 och därigenom erhålla samtliga kongresshandlingar.

Kom med friska initiativ, nya idéer, arbetslust och glatt humör ty att kongressen skall bli givande, det svarar vi gemensamt för.

Vi hälsar er alla! Tillsammans ska vi försöka göra årets kongress till en länk i Förbundets historia, vilken våra efterkommande skall minnas som det verkliga genombrottet för vårt språk och dess idé.

Grupo Esperantista de Stockholm
Kongresskommittén

La estimataj ostoj.

(Fabelo)

Pär Lagerkvist.

Du popoloj estis en granda milito, pri kiu ili ambaŭ estis tre fieraj kaj kiu ankoraŭ vivigis pasiojn, kompare al kiuj la etaj, ĉiutagaj pasioj de la homoj estis kvazaŭ nenio. La resto de la popoloj, postvivintaj donis sin al ĝi kun fanatika ardo. Ambaŭflanke ĉe la limo, kie la batalo ondis tien-reen kaj la batalantoj kruele¹⁾ masakriĝis, oni starigis gigantajn memormonumentojn por siaj falintoj sin oferintaj por la patrujo, ripozantaj nun en ĝia tero. La homoj pilgrimis tien, ĉiu al sia monumento, tie oni diris ardajn vortojn super la amasoj pri la herooj, kies ostoj dormis sub la humo²⁾, sanktigita de heroa morto, altigita en honoro ĝis la eterneco.

Kaj disvastiĝis tiam en la du landoj terura famo pri io, kio okazis laŭdire dum la noktoj tie ĉe la malnova batalejo. Estis fantomoj; la mortintoj levis sin³⁾ el siaj tomboj kaj transiris la limon, vizitis unu la alian⁴⁾, kvazaŭ ili estus repaciĝintaj.

Profunde ekscititaj oni aŭdis pri tio. La falintaj herooj, la adoritoj de la tuta popolo, vizitis la malamikon, repaciĝis kun ĝi. Estis konsternige!

La du popoloj eksendis po unu komitato por esplori la aferon. Oni embuskis⁵⁾ malantaŭ kelkaj velkintaj⁶⁾ arboj, restintaj tie kaj atendis la nokto-mezan horon.

Terure, estis efektive vero. El la dezerta tero leviĝis timigaj figuroj kaj transiris la limon, ŝajnis, kvazaŭ ili portus ion. Oni rapidis al ili plena de kolero:

— Kio? Vi, kiuj oferis vin por via lando, vi, kiujn ni adoras super ĉio, al kiuj ni pilgrimas por soleni kaj memori, kies ripozlokon ni konsideras sankta⁷⁾, vi interfratiĝas kun la malamiko!? Vi repaciĝas kun ĝi!

La falintaj herooj rigardis mire al la komitato:

— Certe ne. Ni malamas unu la alian kiel pli frue. Ni nur interŝanĝas ostojn, tiurilate tute ne estas ordo ĉi tie.

Notoj por komencantoj: ¹⁾ ohylligt ²⁾ mullen ³⁾ steg upp ⁴⁾ varandra ⁵⁾ lade sig på lur ⁶⁾ förtvinade ⁷⁾ håller heligt.

El la sveda: F. Szilágyi.

“La Plej grava Tasko”.

En sia atentinda artikolo “La Plej grava Tasko” Stellan Engholm skribas interalie: “Ke nia situacio nun estas multe pli malforta ol antaŭ dek jaroj, dependas ne nur de plurjara izoleco kaj politikaj konjunkturoj. Dependas ankaŭ grandparte de ni mem. Ni forĝis ekzerci la lingvon, forĝis paroli ĝin. Ni fariĝis pasivaj. Ni volonte donas al aliaj la taskon lerni esperanton, sed por ni mem tio estas tro teda kaj tempopostula afero”.

Kion diri pri la kritiko de Engholm? Ĉu la kritiko estas ĝusta? Jes, bedaŭrinde ni esperantistoj ne agas pli racie ol Engholm priskribas en sia artikolo. Kiom el ni vere kaptas ĉiun okazon por ekzerci la lingvon? Kiel ni agas en niaj kongresoj, konferencoj kaj klubkunvenoj? Ĉu Espe-

ranto tie okupas la honorlokon? Jes, ni ja tie “bele” parolas pri la lingvo, sed ni forĝas, ke centprocentaj esperantistoj ne nur parolu “pri” la lingvo, sed prefere “en” ĝi...!

Kiom el la ĉeestantoj en la tre sukcesa kongreso en Karlskoga ne konstatis la emon de la kongresanoj ekskluzive paroli svedlingve. Eĉ dum la punkto “Salutoj kaj raportetoj de grupaj reprezentantoj” oni parolis svedlingve...

Pro kio forĵeti tiom bonan okazon montri al al neesperantista publiko, kiu ĉeestas en la kongresoj, ke vere eblas paroli Esperanton, ke ĝi estas viva lingvo... Des pli, ĉar multaj el la raportoj estis “malgrasaj” kaj pesimistaj, kiuj certe faris malbonan impreson ĉe la gastoj... En la venontaj kongresoj ni nepre raportu esperantlingve... precipe se niaj raportoj ne estas tre brilaj!

Koncerne la grupkunvenojn... Ĉu ni ne en niaj kunvenoj ankaŭ ofte “pekas” aŭ forĝas paroli esperanton? Sed kial? Ĉu ni ne aliĝis al la grupo kun la celo ekzerci kaj praktiki la lingvon?

Engholm skribas: “Paroli esperanton — tio estas la plej grava punkto. Nur parolante oni lernas paroli, tiel estas en ĉiuj lingvoj, ankaŭ en la gepatra. Esperanto ne estas escepto. Nur en tio ĝi estas escepta, ke oni multe pli facile povas lerni paroli ol en aliaj lingvoj kaj ke oni povas ekzerci parolon en sia hejma medio same bone kiel en eksterlando”.

Ni nepre sekvu la konsilojn de Engholm kaj tiumaniere provu fariĝi perfektaj esperantistoj, kiuj ne nur bele parolas “pri” la lingvo, sed ankaŭ en ĝi! Ni montru al la publiko, ke la ofte akcentita facileco de Esp. ne estas troigo...

E. Hult.

Scienco kaj tekniko.

Pentekosta diskuto pri organizo?

Post mia alvoko en la januara numero mi ricevis kelkajn respondojn, kiuj montras ke intereso ekzistas por la ideoj esprimitaj en la alvoko. Mi proponas ke dum la SEF-kunveno en Stockholm pentekoste ni kaptu la okazon intime diskuti la eblecojn organizi la esperantistajn sciencistojn kaj teknikistojn en Svedio eble kiel sekcio de SEF. Interesataj personoj povas skribi al Alexandersson, TNC, Västerås.

La idolo Evoluo.

“Aliajn diojn vi ne havu krom min!” — Kiam klero fariĝis pli komuna la homoj pli kaj pli perdis sian fidon je la dioj de ilia religio kaj komencis serĉi aliajn. Sen ia kredo la vivo ŝajnas senseca, kaj dum la — eble nekonscia — serĉado ili trovis novan gloran dion, sub kies protekto oni povis trankvila kaj feliĉa vivi. La Evoluo estis la dio de la nova epoko. Scienco kaj tekniko estis ĝiaj anĝeloj kaj la evangelio estis la leĝoj de la naturo. La kulturantoj de la scienca kampo sentis sin profetoj, kiuj regalis la soifantojn per sankta kaliko.

La homoj akceptis la tezon pri la evoluo kaj poste ili forĝis pensi. Ĉar nun oni vidas ke homoj kiel granda ŝafaro kuras en unu direkton penante kuri iom pli rapide ol la kunhomoj, kaj pli granda

Veiko Johannes.

(Daŭrigo)

Rakonto de Einar Wallquist. Trad. Hj. Dahlén.

La infanoj malsatis sur la montegoj kaj serĉis frostitajn empetrojn sur terpecoj, kie la neĝo degelis. Nun iliaj stomakoj ne toleris la multegon de bona manĝaĵo. Ĝi nur trafluis en ili. Palaj ili kuŝis en siaj puraj litoj kaj havis dolorojn en siaj stomakoj. La patrinoj bezonis ripozon kaj kvieton. La patrino de Veiko Johannes daŭre sangis. Ŝi estis kavokula kaj grizhaŭta, sed nur perforte ni povis instigi ŝin resti en sia lito. Ŝi estis pelata de siaj zorgoj pri la infanoj, spite ke la virinoj promesis zorgi pri ili.

Mem Veiko Johannes tamen jam la sekvantan matenon estis vigla kaj gaja. Je plej bona humoro li ĉirkaŭpaŝetis, faris tie kaj tie etajn friponaĵojn, manĝis, ridis, banis, ŝanĝis vestojn, kaj preskaŭ la tutan tagon li kuris inter la piedoj de la plenkreskuloj. Ŝajnis tie ĉi esti bona loko: vivoplene kaj vaste, ofta manĝo kaj multe de manĝaĵo.

Grandaj homoj faris vizitojn kaj donacis ludilojn kaj bombonojn. Kaj eĉ se la nova trikita lanjako estas multe tro granda, ĝi tamen estas bela kaj varma. Veiko kuregis kiel ermeno tien reen inter ĉambroj kaj korto. Nur momenton li trankviliĝis por sidante sur la perona ŝtuparo rigardi kaj plengorĝe ridi, kiam la grandaj buboj ludis per piedpilko kaj dume maltrafis, falis kaj faris grandan bruon je ĉiu nova celpafo. Veiko Johannes ŝajne estis kontenta pri sia tago.

Sed aliaj ĉirkaŭlamis, havante skrapvundojn kaj ŝufrotaĵojn dolorantajn. La plej etaj kuŝis en siaj litoj, senhaŭtaj ĉirkaŭ la anuso. Tagojn kaj noktojn ili estis en la samaj malsekaj vestoj, ne povante plendi, kaj la "rezulto" frostfiksiĝis je la haŭto. Al multaj doloris la fingropintoj pro la frosto sur la montegoj, kaj la arda sunbrilo kontraŭ la blanka neĝo incitis nazon kaj vangojn, kiuj nun ŝvelis kaj havis vezikojn. Kelkaj kuŝis surventre kun dolorantaj okuloj blindigitaj de la suno, premanante sian vizaĝon en la kusenon. Estis malgajiga aro.

Sed ili mirige baldaŭ pliboniĝis, kaj jam post

efikeco estas la celo. Estus sane por la homo trankvile sidiĝi iom kaj pripensi. Kial ni ĉiuj kuras en tiun direkton? Kia estas la celo por ĉiuj niaj klopodoj? Ĉu vere nur pli kaj pli granda efikeco daŭre povas kontentigi la homan animon, kiam ni vidas ke tiu efikeco en la manoj de subpremantoj povas esti uzata por strangaj cerbdifektaj ideoj, kiuj kondukis la homaron ĝis la abismo? Se tiu efikeco ne staras en servo de bonaj fortoj ni preferu ne posedu ĝin. Ĉar socio kaj kunvivado staras sur alta nivelo nur se homeco kaj boneco estas ĝenerala kaj alte taksata propraĵo de la popolo.

Scienco kaj tekniko povas el la tero krei sufiĉe agrablan loĝejon kun sufiĉa kvanto da feliĉo por ĉiuj ĝiaj loĝantoj. Sed bedaŭrindaj estas la homoj se diktatoroj uzas la teknikon por des pli efike subpremi ilin. Ni sciencistoj kaj teknikistoj fidele laboru en la servo de la evoluo, sed ni ankaŭ mem devas decidi k i a n evoluon ni deziras.

Salex.

kelkaj tagoj la animstato en la loĝejo estis alia. Fariĝis intima kaj gaja kamaradeco kaj oni montris rimarkindan helpemon kaj senton de solidareco. La pli aĝaj vere daŭre portis super la okuloj signojn de sufero, sed la infanoj facile forgesis tion kion la maljunaj ankoraŭ sentis kun la plena forto de travivaĵo. Kompreneble oni ne povis tute eviti la grincadon, kiu estiĝas tie kie multaj homoj puŝiĝas inter malvastaj limoj. Ŝerctona admono aŭ severa ordono tamen baldaŭ regvidis la kunestadon en pacajn formojn. En la loĝejo estis susurado kaj babilado kaj nefacila laboro por tiuj, kiuj devis estri la tuton, la ĉefinstruisto, la estriroj de la komunumaj hejmoj kaj aliaj memvolaj helpantoj. Ne malplej peniga tasko estis prepari la manĝaĵon, kiu je miriga kvanto malaperis en la longan vicon da malsataj buŝoj.

Ĉiutage venis novaj grupoj. Samaj scenoj repetiĝis, sama aliiĝo higiena, sama revekiĝo el la letargio akompananta la penegojn.

La suĉinfanon, kiu trinkis akvon kun tritikogrioj, ni akceptis en la malsanulejon, kie li rapide saniĝis. Matene, tagmeze kaj vespere la patro venis por rigardi sian filon, ridetis kaj ĝojis pro la pliboniĝo. Jen la bubo estas lia tuta havaĵo. Iun tagon ni ricevis sciigon el Finnlando, ke la fratino de la viro povos akcepti kaj prizorgi la infanon. Patro kaj filo forvojaĝis. Kun kortuŝa mallerteco, sed kun amo tia, kian oni apenaŭ povus atendi ĉe tia altkreska fortegulo, li portis la kunligaĵon kun la infano al la aŭtobuso. La lasta, kion mi vidis de li, estis varma rideto ĉe la ventmordita vizaĝo kaj distreca rigardo de liaj okuloj. Ĉu li rigardis antaŭen al la nekonata malproksimo aŭ returnen al la estinto, tion mi ne scias. (Daŭrigo)

Gratulon!

La rektoro de Sveda Esperanto-Instituto, dro Karl Söderberg, estas elektita rektoro kaj ĉefinstruisto de la popollernejoj de Upsala. Ĉiuj svedaj esperantistoj gratulas rektoron Söderberg!

Gefianĉoj:

Elsbeth Guggenbühl

Otto Walder

Meilen, Romanshorn, Svisujo

Pasko 1945

Äntligen ha vi lyckats träffa överenskommelse om ett nytt lager av de så efterfrågade

Bordsstandaren

med text ESPERANTO och grön stjärna. Prima siden, kantad med guldsnodd och försedd med tofsar. Högelegant. En fin och ofta använd presentartikel vid bemärkelsedagar. Varje klubb bör ha ett bordsstandar för sammanträden och festliga tillfällen. 15×24 cm. Pris kr. 13:50 inkl. oms. och porto.

Flaggstånd till d:o. Trevlig modell. Kr. 7:— inkl. porto och oms.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 19071

Stockholm 19

Postgiro 578.

SEF Kolono

Dagordning vid förbundsmötet 1945.

1. Repr. för GES hälsar kongressdeltagarna.
2. Tal av förbundsordföranden.
3. Fastställande av dagordning.
4. Val av mötesfunktionärer: Ordf., vice ordf., sekreterare, vice sekr., pressombud, valkommitté, justeringsmän.
5. Val av ombud till Förlagsföreningens årsstämma.
6. Hälsningar av föreningarnas representanter.
7. Justering av röstlängden.
8. Styrelsens berättelse.
9. Revisorernas berättelse.
10. Fråga om ansvarsfrihet för styrelsen.
11. Val av styrelsemedlemmar: Ordförande, kassör, vice sekreterare, en suppleant (för 2 år) och sekreterare (för 1 år).
12. Val av 2 revisorer och 2 suppleanter för dessa.
13. Motioner.
14. Fråga om arvode åt funktionärerna.
15. Årsavgiftens storlek för år 1946.
16. Ombudsmannafonden.
17. Rapport om I E L.
18. Rapport om Svenska Esperanto Institutet.
19. Val av styrelsemedlem och suppleant i Institutet.
20. Övriga frågor.

KONGRESSOMBUD uppmanas insända fullmakt att representera sin klubb i god tid före årsmötet.

DIPLOM. De klubbar som önska erhålla diplom för sådana medlemmar som varit anslutna till SEF minst 10 eller 25 år skola i god tid före årsmötet insända ansökan härom å fastställt formulär SEF 11.

KLUBBRAPPORTER saknas ännu från ett flertal klubbar betr. medlemsnumerär under 1944 och därför är styrelserapporten säkerligen missvisande, då den visar en minskning av såväl klubbar som medlemmar jämfört med 1943. Kassören hoppas dock till årsmötet ha fått in felande uppgifterna, så att vi då kan meddela siffror som i stället visa den ökning under 1944, som vi faktiskt tro förefinnes.

MOTIONER. 3 motioner ha inlämnats i stadgeenlig tid och komma upp till behandling vid årsmötet. Motion nr 1 behandlar planläggning av förbundets efterkrigsprogram samt upprättandet av en stödorganisation förslagsvis kallad »Esperantos vänner — Amikaro de Esperanto». Motion nr 2 behandlar likaledes förbundets närmaste uppgifter efter kriget samt frågan om en starkare garant-institution. Motion nr 3 berör SEF:s aktiva stödande av Förbundet Mänsklig Gemenskap. Styrelsen har tillstyrkt de båda första motionerna men avstyrkt den sistnämnda.

RESEBIDRAG kommer att utdelas först vid 1946 års kongress av de medel som inflyta i år genom den förhöjda deltagareavgiften. Därigenom hoppas förbundet kunna få med representanter för avlägset liggande klubbar, som nu på grund av ekonomiska svårigheter ej ha möjlighet bevista våra årsmöten.

NÄSTA KONGRESS. Förbundsstyrelsen emotser vid detta årsmöte inbjudan från någon klubb villig att åtaga sig värdskapet för SEF:s 40:de årsmöte 1946.

T. f. sekr.

ANSLUTNA KLUBBAR.

Vi lämna här en förteckning över de klubbar som under år 1944 varit anslutna till SEF. Vi upptaga för kontrollens skull även de klubbar som voro anslutna under 1943

men ej erlagt några avgifter för 1944. Siffran efter klubbens namn anger det medlemsantal, för vilket klubben erlagt avgifter. Denna lista kommer även att göra tjänst som röstlängd vid årsmötet. Siffrorna gälla pr den 15. 4. 1945.

Alingsås (8) (inga kort), Boden (7) (inga kort), Borlänge (15), Borås (27), Eksjö (9), Eskilstuna (18), Eslöv (11), Falköping (13), Falun (8), Faringe (6), Gävle (12), Göteborg (21), Hallsberg (15), Hallstahammar (11), Herrljunga (6), Hishult (6), Halmstad (0), Hudiksvall (0), Hälsingborg (16), Härnösand (6) (inga kort), Jönköping (13), Karlskoga (56), Karlstad (7), Kristianstad (17), Krylbo (15), Kumla (17), Lidköping (10) (inga kort), Lund (22), Malmköping (0), Malmö (103), Motala (11), Norrköping (45), Nybro (0), Nynäshamn (7), Nässjö (3), Orrefors (0), Sala (0), Skara (10), Skövde (33), Smedjebacken (13) (inga kort), Sollefteå (13), Stockholm (107), Strängnäs (0), Strömsnäsbruk (0), Sundsvall (15), Surte (12), Svensbro-Borgunda (0), Tibro (0), Tierp (6), Tranås (8), Uddevalla (11), La Fajrero, Uddevalla (14), Ulricehamn (8), Uppsala (30), Vetlanda (10), Vimmerby (8), Vingåker (8), Västerås (7), Ystad (11), Örebro (33).

Tillsammans 50 betalande klubbar. Summa klubbanslutna medlemmar 898. Direkt anslutna medlemmar 112.

Birger Gerdman.



Meddelande från Esperanto-Institutet

Interesa somerumejo kaj kurso en Finnlando.

Jam en la februara numero de nia gazeto ni publikigis artikolon pri la somerkurso en la bela Punkaharju la 8—14 julio. Kosto por loĝo kaj manĝo 60 kr. Petu informojn ĉe: S-ro Kaarlo Jokinen, Töölöntullinhatu 7. A. 2, Helsinki, Finnlando. La kostojn oni povas pagi en Svedlando. Observu, ke plena suneklipso okazos dum la somerkursoj kaj ke la loko de la kursoj situas ĝuste en la meza linio de la plena eklipso!

Deltag i Esperantos sommarläger!

Förra sommaren samlades ett 60-tal esperantister för att njuta sin sommar-semester i esperantos tecken. Alla deltagarna voro överbelåtna, ty man hade fått intressanta föreläsningar, angenäm samvaro och daglig övning i att samtala på esperanto. Slutligen hade man fått stärkande friluftsliv med bad i en leende natur.

Denna sommar bjuder samma förmåner.

Björkås 1—7 juli. Föreläsare: T. Morariu, E. Adamson, E. Dahl. Anmälningar sändas till Greger Andersson, Brl. 170, Åmotfors före den 1 juni.

Jursla (Norrköping) 15—22 juli. Föreläsare: Fr. Szilagy, Stellan Engholm, Karl Söderberg. Anmäl Eder till Nils Johansson, Karlshovsvägen 46, Norrköping.

Deltag!

”Cirkulero al la ”Juganaj” Esperantistoj.

Ĉu vi aŭ viaj amikoj, konas anon — esperantiston aŭ ne — de Junulgastejoj (J. G.). Sciu, ke esperanto estas multe disvastigata en Franca Movado de Junulgastejoj. (Franclingve: ”Auberges de Jeunesse” — Anglalingve: ”Yuth Hostels”.) Aliparte la Franca Movado intencas fondi Junulgastejon Internacian: esperanto multe utilus. Pro tio, ĉar paco baldaŭ revenos: gejunuloj el ĉiuj landoj, unuigu per esperanto! Skribu esperante al:

S:ro Albault André, Foyer des Auberges de Jeunesse, 12 Ave J. Jaurés, Reims (Marne)

Frankrike.”

S:ro André peras ankaŭ korespondadresojn.

Senlabora estona rifuĝinto,

civila inĝeniero Rein Kapper, fakulo en la domkonstruado, serĉas ian laboron.
Adr.: Estn. förläggningen, PÅSKALLAVIK.

Esperanta Studservo.

Esperanta Studservo, som just avslutat sin tredje årgång, tycks ha blivit en uppskattad och outhärlig detalj i vårt esperantoliv. I likhet med många esperantister anser institutet, att denna studieform bör fortsätta. Förarbetena för en fjärde årgång har just påbörjats, och under året inkomna ändrings- och förbättringsförslag komma att övervägas.

Redan nu upptages anmälningar till fjärde årgången. Priset blir som hittills endast kr. 3:50 (eller kr. 3:90, om man samtidigt vill passa på att beställa även examenstexterna för de båda terminerna). Även denna gången insättes avgiften på postgirokonto 38714, Malmö Esperantoförening, Malmö, som i likhet med de föregående åren svarar för de organisatoriska detaljerna.

Esperanta Studservo har visat sig vara till gagn för såväl det enskilda studiearbetet som kursarbetet. Det är en effektiv studieform. Institutet hoppas därför, att så många esperantister som möjligt anmäla sig, och att de, som redan känna till systemets fördelar, uppmanar klubbmedlemmar och andra att prenumerera.

Gör oss en tjänst: Anmäl Eder genast! Annars glömmer Ni bort det.

Hela årgångar av Esperanta Studservo kan nu på en gång erhållas mot det ursprungliga priset. Inbetalning sker till ovannämnda postgirokonto.

- 1. årgången kr. 3:—
- 2. „ kr. 3:50
- 3. „ kr. 3:50
- 4. „ kostar alltså kr. 3:50
- med examenstexter kr. 3:90

Samtidigt vilja vi lämna ett meddelande till kurser: Texter till samtliga kursdeltagare sändas gärna i ett enda kuvert till en viss, angiven adress (kursledaren eller någon kursdeltagare). Ett sådant förfaringsätt har under det gångna året praktiserats med gott resultat, och det underlättar givetvis i hög grad distributionsarbetet. Men ett oeftergivligt krav är givetvis, att emottagaren verkligen distribuerar texterna till samtliga kursdeltagare.

Svenska Esperanto-Institutet.

Sveda Instruista Esperanto-Federacio
(Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20 Göteborg V
Telefon 14 93 43 Postgiro 3 14 30

Esperanto i skolan.

Ännu en gång rikta vi en vädjan till esperanto-kunniga folkskollärare att redan nu planera kurser i esperanto i skolan dels i samband med den s. k. »fritidssysselsättningen» och dels som frivilligt ämne i 5-e resp. 6-e klassen.

Popollernejaj esperantokursoj de la jaro finitaj en Karlskoga kaj la junulara sekcio "la aglidoj" fondita.

La duan paskotagon kolektiĝis esperantistoj en Karlskoga por festi la finadon de ĉi-vintraj esperantokursoj.

Speciale ni bonvensalutis esperantostudentajn

gelernantojn el popollernejo. Ekzamenatestoj estis disdonataj al la gejunuloj kaj aliaj esperantostudentoj. La saman vesperon estis decidite fondi junularan sekcion al Karlskoga Esperanto-Societo, La Aglo, kaj tio ankaŭ estis farita. Dek naŭ gejunuloj enskribis sin en la nove fonditan klubon.

Marde la 10-an de aprilo havis la junulara sekcio sian unuan kaj marde la 17-an sian duan kunvenon, kiuj ambaŭ estis vigle partoprenataj. La membraro de la junulara sekcio nun estas 22.

Por gvidi la laboron de la junulara sekcio La Aglo elektis tri membrojn, de kiuj unu ĉiam helpas gvidi la kunvenojn de la gejunuloj.

La unua granda laboro de la junulara sekcio "La Aglidoj" estas aranĝi la Esperanto-vagonon por infana tago.

Ni admonas ĉiujn esperantajn gejunulojn skribi al esperantaj gejunuloj en Karlskoga. La leterojn adresu al s-ro Rune Ekmark, Box 5117, Karlskoga.

Redakcia sekcio.

SVEDA KRONIKO

LA SKANIA DISTRIKTO.

La jarkunsido okazis la 24-an de marto en la bontemplana salono en Malmö. Delegitoj de ĉiuj kluboj ĉeestis kaj krome alvenis pli ol 100 aliaj esperantistoj. Laŭ la jarraporto la pasintjara laboro estis kontentiga.

La estraro: Jan Strönne, Malmö, prez., Ossian Nilsson, Hälsingborg, v. prez., Lennart Magnusson, Malmö, sekr., Clary Hansson, Malmö, v. sekr., Eric Fredin, Malmö, kasisto, kaj krome Birger Johnsson, Kristianstad, Einar Lemke, Hälsingborg, kun Frans Rasmusson, Malmö, Bernh. Melin, Eslöv, W. E. Lindkvist, Eslöv, kaj C. H. Lindkvist, Eslöv, kiel anstataŭantoj. La reviziistoj: Hilbert Hansson, Malmö, kaj Stina Persson, Malmö, kun Maria Persson, Malmö, kaj Hilma Cederholm, Malmö, kiel anstataŭantoj.

La plenuma komitato de la estraro: Jan Strönne, Lennart Magnusson kaj Eric Fredin, Malmö.

Distrikta studgvidanto: Jan Strönne.

Reprezentanto ĉe la SEF:a jarkunsido en Stockholm: Ossian Nilsson, Hälsingborg.

Prepara komitato por la elektoj 1946: Ester Andrén, Malmö, Hans Pettersson, Lund, kaj Britta Adolfsson, Hälsingborg.

La jarkunsido diskutis multajn organizajn detalojn, kaj skizis la jaran programon. Sinjoro Ture A. Edberg, Mölleberga, antaŭe multjara sekretario de la distrikto, donacis al la distr. jubilean flagon el silko. La prez. alportis la dankon de la distr. kaj memorigis pri tio, ke la sama persono donacis belan flagon ankaŭ ĉe la 5-jara jubileo.

La venontjara kunsido okazos en Lund.

Multaj salutoj en leteroj kaj telegramoj alvenis. Al la Gotenburga distrikto ne estis eble sendi respondtelegramon, ĉar ni ricevis ĝian saluton tro malfrue.

P-into.

La 10-jara jubileo okazis vespere la saman tagon. Post muziko kaj salutparolado, en kiu la distrikta prezidanto bonvensalutis i. a. la prezidanton de la estona esperantofederacio, inĝeniero Rein Kapper, la prezidanton de la esperantoklubo en Pärnu, sinjoro Elmar Kalmus kaj la prezidanton de la skolta esperantoasocio en Germanujo, sinjoro Rud. Petri, sekvis mallonga parolado de sinjoro Jan Strönne pri la distrikta laboro dum 10 jaroj.

Inĝeniero Rein Kapper poste en bonega maniero rakontis pri siaj travivaĵoj dum la milito kaj pri la ĉiutaga vivo en Estonio dum la okupado. Aplaudoj asertis, ke la geĉeestantaro ege ŝatis la lertan preleganton.

Fraŭlino Lussi Lundborg poste kantis kaj prezentis i. a. "La dimanĉon de la somerpaŝtistino" en esperanto. La teatraĵo "Intervenajo" en du aktoj estis verkita speciale por la jubileo kaj altiris grandan atenton. La teatra grupo de Klubo Esperantista de Malmö nun estas tiel lerta, ke ĝi povas prezenti preskaŭ kion ajn. La publiko dankis per floroj al ĉiuj geaktoroj, Reinhold Hansson, Hildur Wallin, Vera Brandt, Helge Andrén, Ester Andrén, Jan Strönne, Alve Persson kaj Sture Persson.

Pli ol 60 personoj ricevis la diplomon de SEF por 10-jara membreco. La distrikto ricevis specialan permeson de SEF distribui ilin dum la jubilea festo.

Sekvis tre agrabla kunestado, dum kiu oni montris la francan propagandofilmon "Antaŭen", inĝeniero Rein Kapper kantis kaj ĉiuj sin amuzis dum la danco.


Entute treege agrabla jubileo, kiu certe donis pli grandan forton al la distrikta laboro. **Iu.**

Hishult, La Verda Stelo jarkunvenis 133 45. La estraro: prez. kaj sekr. Malte Markheden, kasisto Hugo Johansson. La klubo kunvenas la unuan kaj trian mardon ĉiumonate ĉe Folkbiblioteket. Dum la kunvenoj ni studas nian lingvon laŭ Sistema kurso de Seppik-Malmgren. Ni ankaŭ iomete legis kaj pritraktis la libron Hindo rigardas Svedlandon de L. Sinha.

Esperantoklubo de Tranås. Adjunkto Sven Borg kontribuis per tre interesa prelego pri la urbo de la cikonioj, nome Ribe en Danlando, ilustrante la prelegon per belaj fotoj. Je alia okazo la sekretario Ruben Andersson rakontis pri Vingåker kaj rerakontis paron de okazintaĵoj, kiuj koncernis la posedantojn de la bieno Säfstaholm. Meze de Decembro la klubo havis kunvenon, al kiu estona adjunkto estis invitita. En bona Esperanto li rakontis pri sia hejmlando.

La estraro por la jaro 1945 estas jena: prez. Åke Wiman, vicprez. Ivar Albertsson, kasisto Sven Borg, sekr. Ruben Andersson kaj Linnea Fransson. Revizoroj estas Yngve Andersson kaj Agnes Löf, anstataŭanto Gustaf Löf. IEL-delegito estas Åke Wiman. La kunveno decidis aboni unu ekz. de "Malgranda Revuo" por la klubo. **R. A—n.**

Kristianstad, La Verda Stelo. La estraro por 1945 konsistas jene: prez. Birger Johnsson, vicprez. S. Hycht, sekr. Hanna Levin, vicsekr. P. O. Persson kaj kasisto Ture Levin.



Karlskoga esperanto-societo starigas Migrantan pokalegon por siaj membroj.

Por instigo de laboro en Karlskoga Esperanto-Societo La Aglo, donacis samideano Edvin Bonander migrantan premion al la societo por donacado al la plej energie kaj utile laboranta membro ĉiujare.

Por taksado la laborvaloron de la membroj estas nomita de s-ano E. Bonander tri-persona komitato, kiu skribis la statutojn laŭ kiuj la taksado okazos.

Krylbo Esperantoklubo jarkunvenis en februaro. La estraro: prez. W. Henriksson, vicprez. K. Bengtsson, sekr. B. Sjöberg kaj kasisto B. Nordström. La klubo kunvenas alterne en Krylbo kaj Avesta. Du daŭrigaj kursoj laboras en Avesta. Unu el ili studas la historion de esperanto. Cetere ni studis "Esperanta studservo". Du fojojn vizitis nin germana rifuĝinto, kiu rakontis pri siaj travivaĵoj. Dum la jarkunveno s:ro Morariu vizitis nin kaj prelegis pri Svisujo. Du el la membroj faris buŝan ekzamenon.

Lund 23. 1. La klubo jarkunvenis. Agada kaj revizora raportoj estis aprobatataj kaj la estraro ricevis malŝarĝon por sia agado.

La estraro por la jaro 1945: Olle Anderberg, prezidanto; Edvin Falck, kasisto; Gust. Lidbjer, v.prez.; Nils Persson, sekretario; Sven Andersson, v.sekr. kaj Fritz Bengtsson, bibliotekisto.

Anstataŭantoj: Sigfrid Jönsson kaj Sven Nilsson. Revizoroj: Hans Petersson kaj Karin Hansson. Reprezentanto de Esperanto Societo Eldona: Gust. Lidbjer.

Delegito de I.E.L.: Hans Petersson.

S:roj N. Persson kaj H. Petersson estis elektataj funkcii kiel reprezentantoj al la dekjarjubilea jarkunsido de Skania Esp. Distrikto, kiu okazis en Malmö la 24 an de marto 1945. Iu samideano demandis la estraron, kial oni ne faris ion por festi 15 jaran jubileon de la klubo. La kasisto respondis, ke la estraro aranĝis Lucian vesperon, en kiu nur malmultaj samideanoj partoprenis. S:ro S. Jönsson sciigis ke la semajngazeto Folket i Bild donacos senkoston frapilon al tiuj asocioj, kiuj estas dek aŭ pli da jaroj aĝaj. Krom la pritraktado de kelkaj demandoj okazis ankaŭ kaftrikado kaj babilado. **N. P.**

p o l y g l o t t
lingva kaj skriba servo
 pokalv. 4 stockholm tel. 44400

tradukoj en ĉiuj kulturlingvoj fare de indiĝenoj kompetentaj pri sciencoj inĝenieraj, jura, medicina kaj ceteraj fakoj.

lernohelpo per korespondado! pedagoga korektado de stilekzercoj en germana, angla, franca, rusa, hispana, greka, latina.

multigrafado de ĉiu speco. moderna leter-reklamo, kovertskribado, distribuo, artaj kaj personaj posedmarkoj, plaĉaj vizitkartoj!

lingvokursoj laŭ rekta metodo. konversaciaj rondoj kun ununure eksterlandaj instruistoj. aliĝu tuj! petu nian prospekton!

Grupo Esperantista de Stockholm. Kunvenoj dum la monato aprilo: La 4an ni ĝuis de lingvaj instruoj de s-ro Nylén, kiu pritraktis parte la diversajn veturilojn kaj ŝipojn, parte la diferencon inter vortoj kun kaj sen la sufikso "-ec-". Poste ni aŭdis detalplenan paroladon de s-ro Skog pri la historio de Esperanto en Svedlando dum la jaroj 1901—1907. — La 11an ni daŭrigis la "Lingvajn ekzercojn" sub gvidado de s-ino Julin, tradukante la tekstojn sub lumbildoj el diversaj serioj. — La 18-an ni ricevis viziton de KELI, kies membroj prizorgis la programon. En la kadro de komuna kantado kaj muziko de piano kaj fluto ni aŭdis paroladetojn pri la vivspertoj de la parolantoj, pri tio, kiel "Kristano fariĝis esperantisto" kaj "Esperantisto fariĝis kristano" kaj krome recitadon de poemoj. — La 25an ni pro malsano de la prezidanto devis ŝanĝi la programon kaj aŭdis malgrandan sed varmkoran paroladon de s-ro Hornö el Gotenburgo pri lia vojaĝo al Finnlando, speciale al Helsinki, Lahti kaj Åbo, en kiu li akcentis la gastamecon de la finlandaj samideanoj kaj la valoron de Esperanto por la vojaĝanto. — Ankaŭ la preparon de la venonta kongreso okupis nin multe en la kunvenoj.

B.

Svenska Esperanto-Tidningen
La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:—. Lösnummer 0:35.
 Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 19071, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL (Sveda Teritorio): Chefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrens väg 27, Stockholm 32. Poshtcheka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

Örebro. La Gubernia distrikto jarkunvenis la 24an de marto. Prezidis Ph. Jansson. Delegitojn sendis la grupoj en Örebro, Kumla kaj Karlskoga. La raportoj sciigis, ke plej vigle agadis Karlskoga, kies delegito rekomendis ĝian agadprogramon por 1945. La kunveno komisiis al la distrikta estraro aranĝi laŭkutime someran ekskurson. La agadkaj revizia raportoj estis aprobatataj kaj malŝarĝo estis decidata kun danko speciale pro tio ke la eksiganta estraro sukcesis forigi la deficiton restantan de la Ĉe-metoda kurso. La nova estraro konsistas jene: prez. G. Loman, sekr. Ph. Jansson, kasisto f-ino D. Dahlberg, ĉiuj en Örebro. Ceteraj estraranoj: F. Ström kaj f-ino I. Larsson, Kumla.

YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet

